Raúl Castro vizitas Alĝerion.

La kuba prezidento Raúl Castro, plenumos tritagan laborviziton en Alĝerio celante plifortigi la reciprokajn rilatojn kun tiu nordafrika lando.

Kiel parto de la unua agado en Alĝerio, Raúl omaĝis la martirojn de la alĝeria revolucio en la monumento kiu memoras pri ili en la ĉefurbo alĝeria. La ceremonion partoprenis flanke de Alĝerio la prezidanto de la konsilantaro de la nacio, Abdelkader Bensalah.

La kuba prezidento revuis la honoran taĉmenton de la respublikana gvardio kaj deponis florbukedon ĉe la memorŝtonon omaĝe al la preskaŭ du milionoj da alĝerianoj forpasintaj en malegala batalo kontraŭ la franca armeo kolonia.

La kuban prezidenton akompanas en tiu ĉi vizito tritaga, Ricardo Cabrisas, vicprezidanto de la ministra konsilantaro, kaj Bruno Rodríguez, ministro pri eksteraj rilatoj.